

VENUS' LA FINA VENK'


teatraĵo en dek scenoj

Sceno unu

Kunsido de estraranoj de grava movada organizo, kies celo estas disvastigi la lingvon, kaj tiucele arigi konkretajn formojn pri ĝia nuna stato.

Roluloj en la sceno:

Mart Elobat (prezidanto)
 Krista Tistik (estrarano pri statistikoj)
 Alano Servi (oficisto de CO)
 Bur O'Krat (oficisto de CO)
 Trev Arbema (estrarano pri publikeco)
 Oskar Aktera (estrarano pri ekirpunktoj kaj prognozado)
 Klari Gemul (estrarano pri instruado)
 Miko Nektita (estrarano pri komputado - sidas malantaŭe ĉe komputilo)
 Aldo Nagras (estrarano pri trookupiteco - alvenas poste)



Mart: Kaj la venonta tagorda punkto: tri komo kvar komo du oblikva retro-streko ok dupunkto sep nulo asterisko kvin: taksado de la nombro de esperantistoj en la mondo. En la pasinta kunveno, ni deklaris la strategian gravecon precizigi tiun nombron, due ni starigis niajn elirpunktojn por ĝin precizigi. Eble ni komencu de tiu punkto, kaj mi transdonas la parolon al nia estrarano pri elirpunktoj...

Aldo: *[alvenas haste, malfrue, manĝante sandviĉon]* Pardonu mian malfruon, sed de la sepa ĝis la naŭa mi estis en kunsido de LLK kun KKS, de naŭa ĝis deka en seminario de KER de TEJO, poste en kunordiga forumo kun la PK de SAT, de tiam en la fakkunsido de TEVA, mi tute ne havis tempon manĝi...

Mart: Nu, trovu lokon, atentu pri via sandviĉo. Denove, la parolo al S-ro Aktera. Oskar!

Oskar: Kiom da landoj estas en la mondo?

Krista: Pli ol ducent.

Bur: Do, ni diru ducent dek. Tio estas pli ol ducent.

Alano: Kial ne diri ducent naŭdek? Ankaŭ tio estas pli ol ducent.

Krista: Ducent naŭdek estas pli certe pli ol ducent ol ducent dek estas pli ol ducent.

Oskar: Certe.

Krista: Multe pli ĝi estas pli.

Mart: Do, ducent naŭdek landoj.

Oskar: Mi prognozas, ke la nombro da landoj kreskos je 6% tra la venontaj dek jaroj.

Alano: Do, ducent naŭdek naŭ.

Mart: Kaj plu...

Alano: Niaj Landaj Asocioj havas, laŭ nia statistika esploro, averaĝe mil ducent kvardek sep membrojn...

Trev: Se oni kalkulas tiujn, kiuj iam ajn kotizis...

Bur: ...aŭ donacis...

Oskar: ...aŭ intencis kotizi...

Alano: ...aŭ intencis donaci...

Mart: ...tra la lastaj kvin jaroj.

Klari: Kaj se ni kalkulas tiujn, kiuj ŝovis nazon tra kursejan pordon...

Trev: ...aŭ ne rifuzis varbfolion dum niaj stratfestaj manifestacioj...

Krista: Jes, jes, tiujn ni devas aldone kalkuli! Certe, do... kie mia kalkulilo?...

Bur: Momenton, ne! Tiuj estas jam enkalkulitaj en la supra averaĝo...

Alano: ...mi ne kredas...

Oskar: Ilin ni prefere kalkulu aparte. Alie, mi prognozas, ke ni bedaŭros. Ni ne risku neglekti ilin.

Trev: Kaj ili estas multaj, rigardu ĉi tiun raporton, ĵus alveninta el Nepalo... mi legas ĉirkaŭ la kuglo-truoj... "Ni disdonis kvinmil informilojn surstrate en 25 minutoj kaj devis represi ilin kvarfoje.

Alano: Do, jen dudek mil, kaj nur en unu lando!"

Krista: Ho jes, dudek mil oble 299 estas... estas... kiu forprenis mian damnindan kalkulilon?

Mart: Kial tiu amasa interesiĝo en Nepalo?

Trev: Nu, mi legas plue: "Nia oferto pri gajneblaj senpagaj vojaĝoj al venonta UK en Las Vegas kreis furoran intereson..."

Alano: Sed ni ne planas Universalan Kongreson en Las Vegas.

Trev: Tial verŝajne la varbilo diris "venonta" kaj ne "la venonta".

Klari: Eventuale, aŭ ĉu la verkinto estas slav-lingva gast-instruisto?

Krista: Ha, jen mia kalkulilo inter du panoj de via sandviĉo, Aldo.

Bur: Sed necesas unue fari la bazan kalkulon. 1247×299 kaj poste adicii la 20.000×299 ...

Krista: Jes, jes, mi faras ĉion ĉi.. la rezulto estas...

Trev: Jes, jes, diru! Kio estas la rezulto?

Krista: Momenton, momenton... minus 0.0279472356.

Mart: Tio ŝajnas iom nekredinda.

Krista: Efektive. La klavoj gluiĝis. Aldo, kial vi nepre devas manĝi arakid-pastajn sandviĉojn?

Mart: Prave. Tio montras malrespekton por la seriozeco de nia laboro.

Krista: Mi iros purigi mian kalkulilon.

Alano: Dume, ni pensu pri pli da faktoroj.

Trev: Nu, radio stacioj, dudek tri konataj, kun averaĝe po sep mil aŭskultantoj...

Bur: Televidaj stacioj elsendintaj intervjuojn aŭ raportojn pri ni, dek du, kun averaĝe po naŭdek sep mil spektantoj...

Aldo: Kaj la pasivaj esperantistoj, kiuj malkiel mi, ne aliĝas al asocioj...

Klari: Kaj la eta armeo de eternaj komencantoj...

Trev: Kaj la konvertitaj volapukistoj kaj idistoj kaj interlingvistoj...

Alano: Kaj la aĉetantoj de libroj, kompakt-diskoj, vidbendoj kaj verdstelaj pingloj...

Krista: ...jes, jes, mi aldonis la ciferojn por ĉiuj tiuj grupoj.

Miko: Ne forgesu pri la nombro da hejmpaĝoj. Krom la konata nombro, mi faris apartan esploron. Mi petis serĉilon detekti ĉiujn hejmpaĝojn kun kelkaj tipaj esperantaj vortoj, ekzemple "en", "la", "de", "super", "nur" kaj "for".

Mart: Kaj kiom da hejmpaĝoj vi trovis tiumaniere?

Miko: Okcent naŭdek du mil tricent sesdek unu.

Trev: Ĉiu kun averaĝe kvarcent naŭdek kvar vizitantoj jare...

Krista: Oble, ni diru, tri jaroj... bone, bone, nun mi preparas la finan sumon!

Mart: Mi sentas ke ĉi-foje ni vere progresas en nia strebo. Vi ĉiuj bonege kontribuis hodiaŭ! Vere kreiva pensado. Per tio la movado progresas!

Krista: kaj la grandioza sumo, la nombro da esperantistoj en la mondo estas... estas ... estas...

17	miliono,	973	mil,	428!
----	----------	-----	------	------

[Longdaŭra kaj intensa aplaŭdado, suplementita per trimufaj hupoj kaj krioj]

Krista: Momenton, mi kredas ke restis arahid-pasto ĝuste ĉe la potenciga butono...

Trev: Ne gravas, ne gravas, ni havas rezulton.

Ĉiu: *[hore]* 17 milionoj! 17 milionoj, probable 18 milionoj, estu 18 milionoj, por ne allasi la defetismon, estu 18 milionoj, 18 milionoj...

Mart: Kaj kiom da procentoj estas tio de la monda loĝantaro?

Krista: Momenton: 1.54856%

Ĉiu: Grrrrrr!

Krista: Ne, ne, necesas rekalkuli, naskiĝas konstante novaj beboj: 1.54855.... ...4 ...3 ...2

Trev: Ve! Nur subeniras dum ni aŭskultas.

Krista: Ne ne! Atendu... ...2 ...3 ...3

Klari: Hura, hura, naskiĝis ie esperantista bebo!

Krista: ...3 ...21 ...1.54849 ...8 ...7

Alano: Rondo Familia! Kie vi estas, nun kiam ni bezonas vin?

Krista: ...6 ...5 ...4

Ĉiu: Grrrrrr!

Oskar: Kiam okazis la lasta TEJO-kongreso?

Bur: Antaŭ kvin monatoj.

Oskar: Ve, ankoraŭ kvar monatoj por atendi.

Krista: ...3 ...2 ...1

Mart: Ĉesu kalkuli. Tio nur deprimigas nin. Do, 17 milionoj.

Trev: 18.

Mart: Bone, 18. Kioma proporcio estas tio de la suma nombro de angla parolantoj?

Krista: Momenton: 6,4895747 ...6 ...5 ...4

Mart: Silentu! Ĉesu kalkuli.

Ĉiu: Veeeeee!

Mart: Nia rezulto estas apenaŭ pli kuraĝiga ol de nia lasta kalkulo. Ni prefere serĉu alian argumentadon kaj strategion. Nia vojo estas longa kaj pena. Se nur iu montrus la vojon antaŭen...

Sceno du:

En fora scienca laboratorio pri nuklea fiziko. La kulmino de grava eksperimento proksimas. Meze de la laboratorio estas du teleroj, kovreblaj per kurtenoj. Ili devas funkcii kiel rekvizitoj de magiisto.

Roluloj en la sceno:

Meri Toplen: Diligenta kaj altruisma estrino

Mike Miemas: Kemiisto en la teamo

Leks Periment: Laboratoria asistanto

Adela Bori: Diligenta sciencisto; ŝi prizorgas la komputilon

Derek Tavoĵ: Pekulo, kiu volas ĉefe enspezi el malkovraĵoj

Ken Ireprovu: Gvidanto de ĉefe malsukcesaj eksperimentoj

Kunio Isobata: Japano fizikisto.

Meri: Nia vojo estis longa kaj pena. Sed fine, ni vidas la vojon antaŭen. Ĉiu preta por nia kulmina eksperimento?

Leks: Preta! Por nia eksperimento mi metas pomon sur maldekstra telero.

Ken: Preta! Mi lokos la dekstran teleron tri metrojn for.

Meri: Tri metrojn... sed dekstren, ne maldekstren!

Adela: Mi enmetos la koordinatojn de la dekstra telero, nun ke ĝi vere estas dekstra.

Ken: Nun mi fermu la kurtenojn.

Adela: Kaj mi komencas la transigan algoritmon. *[pulsa, ritma sono audeblas]*

Ken: Nu, ni certe havas ritmon.

Kunio: Ni atingis la kritikan koncentriĝon.

Leks: La elektronoj ekscitiĝis.

Meri: Funkciigu la mas-transigon! *[lumo, fumo]*

Adela: Ĉu sukcesos? Ĉu niaj jaroj da laboro portos fruktojn?

Kunio: ...transportos fruktojn...

Adela: Fortiru la kurtenojn!

Ken: Mi fortiras la kurtenon! Mi malkovras la teleron... *[la pomo efektive transiris]* ...kun pomo sur ĝi!! Miraklo!

Meri: Ni ŝanĝis la vizaĝon de l'scienco!

Kunio: Jes! Jes! Mirinda atingo. Ni povas transigi pomojn!

Derek: Tuj kontaktu la kompanion Monsanto! Ni subskribigu kontrakton.

Adela: Ni kvaronigos ilajn liverkostojn.

Derek: Kiom ni povos postuli? Ses milionojn? Sep?

Meri: Pensu pli grandskale. Se ni povas transigi pomojn... ni povas transigi eĉ... eĉ...

Adela: Bananojn?

Derek: Bananojn, ananasojn, kokosojn, ajnan frukton! Ni postulu dek sep milionojn!

Ĉiu krom Meri: *[ĥore]* Dek sep milionoj! Dek sep milionoj! Prefere, dek ok milionoj, dek ok...

Meri: Etmensuloj, silentu. Ĉu vi ne komprenas kion ni malkovris?

Ken: Mi malkovris la teleron! *[li mimas sian forprenon de la kurteno]*

Meri: Ken, vi vere estas etmensulo. Aliaj! Kion ni malkovris?

Derek: Frukto-transportilon!

Meri: Eble pli, eble malpli! *[dum la parolo Ken frotas sian stomakon, li malsatas. Li prenas la transsenditan pomon de la dekstra telero, iras malantaŭen kaj manĝadas ĝin malrapide kaj videble de la publiko, sed ne de la aliaj roluloj.]* Povas esti, ke ni semis la semojn de scienca trarompo, de nova epoko, ni kreis la kernon de nova scienc-branĉo, de nova muldo-rompa teknologio, kiu malfermos la vojon al fundamentaj transformoj, la vojon al la kvara industria revolucio, la vojon al...

Derek: ...Nobel-premioj!

Meri: Nu, jes. Ni ne antaŭkalkulu niajn pomojn antaŭ la maturiĝo. Unue, ni devos pruvi, ke ni povas sendi aliajn fruktojn. Ni komencu ĉe similaj fruktoj. Kiu frukto plej similas al pomo?

Kunio: Piro?

Ken: Jes, tio iom similas. Ambaŭ havas kvar literojn kaj du el la literoj identas. Tio estas 50-procenta simileco.

Meri: Sed ni imagas bezoni similecon je almenaŭ 70%.

Ken: Do, pensu. Pomo, pomo... domo, domo! Ni povos transigi domojn!

Derek: Tio estos ege pli profitiga ol liveri fruktojn! Por unu averaĝa domtransigo – kvin-kilometra, ni diru – ni povos postuli... dek sep mil!

Ĉiu krom Meri: *[ĥore]* Dek sep mil! Dek sep mil! Dek ok mil! Dek ok mil!

Derek: Kun dudeko da tiaj transigoj jare, tio espezigos al ni... kie estas mia damninda kalkulilo?

Meri: Ĉesu! Homoj, kiujn stultaĵojn vi diras? Ĉu vi estas sciencistoj aŭ komercistoj?

Derek: Sciencistoj estas ni, sed kial eterne malriĉaj?

Meri: Homoj! Estu riĉaj je ideoj kaj imagpovo!

Derek: Nu, ni imagi povas belajn profitojn...

Meri: Sed pensu pli, homoj – pomo hodiaŭ – morgaŭ la...

Kunio: ...domo?

Ken: ...vomo?

Adela: ...palindromo?

Meri: ...la homo! Homo, homoj! Pensu pri la sekvoj!

Ken: Jes, jes! Ni povos sendi homon de maldekstra telero ĝis dekstra telero!

Meri: Etmensulo! Ni povas sendi homon de maldik-strateliro ĝis Rio de Janeiro!

Adela: Aŭ Nov-Jorko, aŭ Romo aŭ Istanbul aŭ Adisabebo!

Ken: Ĉu oni havas telerojn en Adisabebo?

Meri: Atentu, ĉio restas teorio. Ni bezonas novan eksperimenton. Kiu havas piron?

Adela: *[ĉiu rigardas unu la alian]*. Neniu?

Meri: *[malicete]* Se ne pirojn, havas ni almenaŭ... virojn!

Ĉiuj viroj: *[timeme]* Virojn??!!

Ĉiuj virinoj: *[triumfe]* Virojn!!!!

Meri: Precipe unu viro, kiu volas akiri profitojn!

Ĉiu: *[ĥore]* De-rek! De-rek! De-rek! Sur la teleron! Sur la teleron! *[Li ekkuras ronde, la aliaj ĉasas lin, krom Ken, kiu nun finmanĝis la pomon.]*

Ken: Mi helpas vin kapti lin, mi helpas. Sed unue mi demetu ĉi tiun pom-kernon kaj lavu miajn...

Meri: Pom-kerno? Kiu pom-kerno? De kie venas... *[ĉiu ĉesas kuri kaj rigardas la malplenan dekstran teleron.]*

Adela: Ken! Vi fuŝulo. Vi manĝis la unuan kaj solan mas-energi-transigitan pomon en la historio de nia civilizacio!

Ĉiu: Grrrrr! *[ĉiu proksimiĝas al Ken kaj fingromontras lin. Ĥore ili krias:]* Ken! Ken! Ken! Pomkerna Ken! Pomkerna Ken! Pomcerba Ken! Pomcerba Ken! Sur la teleron! Sur la teleron! *[Li forkuras ronde, ĉiu postkuras lin, kaptas lin kaj ligas lin al seĝo sur la maldekstra telero.]*

Adela: Mi rekontrolos la koordinatojn de la dekstra telero.

Ken: Ho, ne, li ne fermu la kurtenojn. *[Kunio fermas ilin]*

Adela: Kaj mi komencas la transigan algoritmon. *[palsa, ritma sono audeblas]*

Ken: Ho, ve! *[de malantaŭ la kurteno]* Ni certe havas ritmon. Aŭ, nun mi havas ritmon.

Kunio: Ni atingis la kritikan koncentriĝon.

Leks: La elektronoj ekscitiĝis.

Meri: Funkciigu la mas-transigon! *[lumo, fumo]*

Adela: Fortiru la kurtenojn!

Kunio: Mi malfermas la kurtenon, kaj mi malkovras... teleron kun Ken! *[Kunio fortiras la kurtenon. Ken efektive transiris, sed malbone aspektas]*

Meri: Ni ŝanĝis la vizaĝon de l'scienco!

Kunio: Ni ŝanĝis la vizaĝon de Ken.

Leks: Jes, ĝi aspektas iom pli verda ol antaŭe.

Adela: Iom pomverda!

Meri: Ken, Ken, ĉu vi aŭdas min? Ĉu vi travivis la transigon?

Ken: Kio okazis al mi? Mi nenion memoras. Mi nur memoras manĝi pomon. Mia stomako doloras. Mia kapo doloras.

Leks: Tio instruu al vi la danĝeron manĝi verdajn pomojn.

Meri: Venu, sidiĝu kaj refortiĝu. *[ŝi helpas al li sidiĝi malantaŭe].* Nun, gekolegoj, pensu kion ni atingis!

Ken: Vi atingis ke mia kapo doloras.

Derek: Ni aĉetu akciojn en aspirin-fabrikejoj!

Meri: Silentu! Ni povas transigi homon de unu loko al alia, kun nur moderaj flankefektoj.

Ken: Mo... Mo... Moderaj?

Meri: Pensu pri la sekvoj. Se ni povas transportigi homojn...

Derek: Nun, mi ekkomprenas. Ni povos bankrotigi la flugkompaniojn.

Adela: Tro malfrue, la plimulto de la flugkompanioj jam bankrotis.

Meri: Ankoraŭ vi ne vidas la plenajn eblecojn. Vi pensas tro etmense.

Derek: Nu, bone, ni povas bankrotigi la trajnkompaniojn, la aŭtofabrikistojn...

Meri: Ne, ne, ankoraŭ vi pensas misdirekte.

Adela: Kompreneble! Nun mi vidas la lumon. Se ni povas sendi homojn de unu telero al alia...

Derek: Ni aĉetu telerfabrikejojn! Iliaj akciprezoj soros...

Meri: Ho, mi senesperigas. Ni povas sendi homojn ĉien ajn. Ne gravas la teleroj. Ni povos doni koordinatojn en tute alia urbo!

Adela: En tute alia lando!

Leks: En tute alia kontinento!

Meri: En tute alia planedo!

Ken: *[delire]* En tute alia restoracio! *[ĉiu riproĉ-rigardas lin]*

Leks: Meri, vi pravas! Ĉielas la limoj!

Ĉiu: *[ĥore]* Ĉielas, ĉiamas, ĉiomas! Pomas, piras kaj homas!, Ĉiamas, ĉiomas ĉielas! Piras, pomas, pli helas! Ĉielas, ĉiamas, ĉiomas! Pomas, piras kaj homas!

Meri: Imagu. La dekstra telero povos esti sur...

Adela: ...la Luno...

Kunio: ...aŭ Marso...

Meri: ...aŭ... Venuso!

Sceno tri:

La esperantistoj serĉas novan strategion.

Mart: Do, ŝajnas ke ni neniam havos kredindan nombron da parolantoj de la lingvo sur la tero.

Miko: Eĉ se ni kreos mil ret-kursojn, dumil babilejojn, trimil vidbendojn...

Trev: Kaj eldonas dudek mil varbilojn.

Mart: Kiukampe ni povos elstari? Eble ni rezignu pri kvanto kaj koncentriĝu pri kvalito?

Klari: Tiun argumentadon ni jam sekvis multfoje, ĉu ne?

Bur: Sufiĉus ke estu unu esperantisto, kondiĉe, ke tiu estu ĉiurilate intelektte kaj stature elstara.

Mart: Hmmm. Proponoj kaj sinproponoj sur poŝtkarto!

Miko: Aŭ ni elektu niajn kampojn pli zorge. Se ĉiuj komputistoj ekuzus Esperanton...

Alano: ...aŭ juristojn...

Klari: ...aŭ instruistojn...

Trev: ...aŭ reklamistojn...

Krista: ...aŭ statistikistojn...

Klari: Ĉi tiujn argumentojn ni jam sekvis multfoje, ĉu ne?

Mart: Konsentite. Ni fermu la diskuton kaj transigu ĝin al la sekva kunsido. Eble tiam ni vidos lumon ĉe la fino de la tunelo.

Sceno kvar:

Tri monatojn poste. La esperantistoj formulis aŭ komisiis formulon de dudek sep strategioj. La sciencistoj plenumis aŭ komisiis plenumon de dudek sep eksperimentoj. La sceno estas ĉe la sciencistoj. Ken kuŝas duondelira sur sofo en la fono. Mike kaj kelkaj novaj kolegoj laboras apenaŭ videble en la fono kaj prezentiĝas nur poste en la sceno.

Meri: Gekolegoj. Ni kunvenis hodiaŭ, ĉar ni vidas la lumon ĉe la fino de la tunelo. Nia plejlasta sukceso estas la trovo de virtuala telero sur Venuso kaj difino de ĝiaj koordinatoj. Kio do nun? Ni povas resumi niajn eksperimentojn, formuli niajn patento-petojn, kandidatiĝi al Oslo, kaj komercigi nian gradiozan malkovron. Kio estas la hodiaŭa tagordo?

Adela: Unue, ni resumu niajn eksperimentojn. Due, ni arigu kriteriojn por la homoj sendotaj al Venuso. Trie, ni elpensu trafan nomon por nia mirinda procezo, kiun la amas-komunikiloj kaj reklamistoj povos bone ekspluati.

Meri: Bone. Punkto unu. Leks, bonvolu resumi niajn eksperimentojn.

Leks: Ni faris dudek sep eksperimentojn. Dudek unu estis sukcesaj. Ni sukcese sendis tri pomojn, kvin pirojn, du kuniklojn, klonitan ŝafon, du virinojn kaj ok virojn ... pli ĝuste dirite, tri virojn kaj Ken kvinfoje.

Ken: Spluighjfh! Piro! Piro mi estas! Ŝejko mi estas! Ŝejkspiro! Konspiro! Pluspiro! Splguf!

Meri: Gratulon, gratulon al ĉiu koncernito!

Ken: ...Ŝejkspiro, Hamleto, Omleto, kirlitaj ovoĵ, kapturnitaj movoj...

Meri: Kaj forton al ĉiu transigito.

Kunio: Sed kio okazis ĉe la sep malsukcesaj eksperimentoj?

Meri: Ne diru malsukcesaj. Diru, niaj malpli evidente sukcesaj eksperimentoj...

Adela: Pri ili ni preferas ne raporti publike.

Meri: Ni resumos ilin, kondiĉe, ke vi ĉiuj ĵuros ne diskonigi la rezultojn...

Adela: Eĉ ne la fakton, ke tiuj eksperimentoj okazis.

Meri: Ĉu ĉiu ĵuras tion?

Ĉiu: Ni ĵuras, ni ĵuras! Rakontu, rakontu.

Leks: Do, en la unua, anstataŭ transsendi piron, ni transformis piron al viro.

Adela: Kaj ĉu la viro pluvivas?

Meri: Jes, eĉ prosperas. Nur estas iom verda ankoraŭ.

Kunio: Verda kiel piro?

Meri: Ne, mi parolas metafore. Li eklaboras por ni, kaj li estas iom sensperta, nematura.

Adela: Kie li estas? Ĉu ni renkontis lin?

Meri: Certe, mi rondvenis kaj prezentis al vi s-ron Lett antaŭ du tagoj.

Leks: Jen li en la angulo. Salutu la homojn, Bart! *[turniĝas pirforma homo]*.

Bart: Saluton, homoj!

Leks: En la dua mis-eksperimento, ni transformis pomon al viro.

Meri: Feliĉe, ankaŭ tiu vivas. Mi prezentis lin al vi samtempe. Ankaŭ li estas iom verda.

Kunio: Metafore verda?

Meri: Ne, verda kiel pomo. Salutu la homojn, Jonatan. *[turniĝas verda pomforma homo]*.

Jonatan: Saluton, pomoj ...err... homoj. Saluton, homoj!

Leks: En la tria eksperimento, ni transformis piron al virino.

Adela: Na! Jen progreso. Ĉu ŝi bonfartas kaj laboras ĉe ni?

Meri: Bonfartas jes, sed ne laboras por ni. Ŝi laboras en glacikremejo.

Adela: Kiel ŝi nomiĝas?

Meri: Helena.

Adela: Kiel ŝi aspektas?

Meri: Ho, ŝi estas tre bela.

Leks: Fakte, sukcesa eksperimento! Kiel diras la francoj: *Poire à la belle Hélène*.

Kunio: Kaj la kvara eksperimento?

Leks: Nu, malpli sukcesa. La piro malaperis.

Adela: Nu, bone, ni povas malhavi unu piron. Eble ĝi reaparos iam, ie.

Kunio: Kaj la kvina eksperimento?

Leks: Pli malsukcesa. La viro malaperis.

Kunio: Ve! Kiu viro? Ne estis Ken?

Meri: Ne, feliĉe. Ken estas ankoraŭ inter ni...

Ken: *[delire]* ...la piro... rapiro, ponardo, pom-ardo, seks-ardo...

Meri: ...aŭ pli precize, malantaŭ ni...

Ken: ...seks-ardo, seks-bardo, Ŝekspiro, eks-piro...

Meri: ...pli malpli...

Adela: Do, kiun viron vi malaperigis?

Derek: Ĉu vi memoras tiun impost-inspektoron, kiu kontrolegis niajn kontojn pasint-semajne?

Kunio: Ha, jes. Li minacis reveni ĉi-semajne kun kriminal-esploristo de la polico.

Leks: Kaj interese, ke nek la kontrolisto, nek la policisto aperis.

Derek: Amuza koincido. Rakontu pri la sesa eksperimento, Lekso, bonulo!

Leks: Certe. Iom pli drasta rezulto. Bona novaĵo kaj malbona novaĵo. Kiun vi volas aŭdi unue?

Adela: La bonan.

Leks: La sendaĵo ne malaperis en ĉi tiu eksperimento.

Adela: Do, kio okazis? Kion vi sendis?

Leks: Ne kion, kiun. Ni transformis viron al piro.

Adelo: Ve. Ĉu ni ankoraŭ havas la piron?

Meri: Jes, jen ĝi en tiu vitra montro-skatolo. Ni tien metis, por ke Ken ne manĝu ĝin ...lin... La maltransiga eksperimento estas planata por la sekva mardo.

Adela: Kio estas tio supre de la piro? Iu malhelblua helmo? Kvazaŭ policista...?

Derek: Lekso, bonulo, rakontu pri la sepa eksperimento!

Leks: Tiu eksperimento konsistigas alian interesan kaj eble ekspluateblan rezulton. Ni transformis viron al... virino.

Meri: Mineke! Mineke! Prezentu vin! *[De malantaŭe aperas Mike Miemas, en peruko kaj virina vestaĵaro].*

Mike/Mineke: *[virinvoĉe]* Saluton, kolegoj!

Mart: Nu, spite tiujn etajn problemojn, ni antaŭvidas perfektigi la procezon ĝis la momento kiam ni estos pretaj sendi esploriston al Venuso. Do, nun ni pluiru al la dua punkto. Ni petis vin kontribui la kvalitojn bezonataj en homo, kiun ni sendus. Adela kompilis la rezulton kaj trovis la dek plej gravajn trajtojn. Ĉu vi havas la liston?

Adela: Mi prezentas al vi la konkludojn *[se teknike ebla, ankaŭ projekciu ilin]*

1. Kapablo sidi senmove dum pluraj horoj.
2. Kapablo resti optimisma spite kruelajn sortobatojn kaj neglekton.
3. Kapablo persisti kaj reprovadi kontraŭ sennombraj obstakloj.
4. Kapablo je supernivela sintezo de ideoj unuavide nekombineblaj.
5. Kapablo komuniki kun renkontotaj estaĵoj sen komuna lingvo.
6. Kapablo elteni ekstremojn de temperaturoj kaj malkomforton.
7. Kapablo krei travivigajn solvojn el malkompletaj aŭ eksdatiĝintaj informoj.
8. Kapablo elteni kruele ekscesajn kaj malhumanajn laborhorojn, sen la necesaj ripozaj kaj feriaj periodoj.
9. Kapablo arigi, trakti kaj asimili amasojn da obskuraj datumoj.
10. Kapablo el tiaj datumoj krei aŭdacajn kaj spirhaltigajn konkludojn.

Meri: Ĉu ĉiu trovas ilin en ordo? Jes? Do, daŭrigu, f-ino Bori.

Adela: Mi nun verŝos tiujn postulojn en la komputilon, kaj petos ĝin serĉi inter ĉiuj konataj rasoj, religiaj kaj sociaj grupoj, por trovi tiun, kiu enhavos la plej kvalifikitan kandidaton. *[Ŝi enklavas datumojn.]*

Leks: Ni sciencistoj volonte irus al alia planedo – sed eble ne en la unua eksperimento.

Adela: Jen la respondo! La komputilo trovas ke la kategorio “samideano” plej bone plenumas niajn postulojn.

Meri: Bonege! Gratulon! Mirinda programo! Mirinda programisto!

Derek: Ni tuj sendu ret-mesaĝon al la Internacia Asocio de Samideanoj por ke ili proponu iun.

Adela: Sed ĉu iu fakte scias, kio aŭ kiu aŭ kia estas samideano?

Bart: Ĉu samideano ne estas raso de eksimecaj homoj el la nordo?

Jonatan: Ne, stultulo, ili estas sameoj.

Bart: Kiel mi sciu? Ĝis antaŭ hieraŭ mi estis nur piro.

Jonatan: Samideanoj estas tiuj kun la blovorkestroj kaj tamburinoj kaj kontraŭ alkoholo.

Bart: Ne, stultulo! Ili estas sav-armeanoj.

Jonatan: Kiel mi sciu? Ĝis antaŭ hieraŭ mi estis nur pomo.

Adela: Mi ripetas, kio estas samideano? Religiuo, Raso, Socia tavolo, reklam-slogano, kio?

Meri: Jes, kio estas samideano? Ĉu via komputilo ne enhavas vortaron?

Adela: Certe, mi demandos ĝin. *[Ŝi enklavas].* Jen, “Samideano estas tia homo, kiu estos ideala kandidato plenumi la dek postulojn, kiujn vi donis al mi antaŭ tri minutoj.”

Meri: Grrrr! Petu pli kontentigan klarigon. *[Adela klavumas]*

Adela: Jes, jen: “Ano de grupo, kiu havas saman ideon kun aliaj de tiu grupo. Termino konstruita unue en internacia lingvo Esperanto kaj aplikata al parolantoj kaj apogantoj de Esperanto kaj aliaj planlingvaj projektoj.”

Meri: Bonege. Trovu ret-adresojn por tiuj planlingvuloj kaj esperantoj...

Bart: Kio estas Esperanto?

Jonatan: Kiu estas Esperanto?

Derek: Silentu! Antaŭ du tagoj vi ambaŭ estis nur fruktoj. Kial vi devu scii? Fakte, kio estas Esperanto?

Adela: Kaj kia estas Esperanto?

Meri: Ni malkovros tion poste. Se Esperanto ekzistas, ĝi havas asocion aŭ societon kaj ĝi havas hejmpaĝon kaj retadreson. Adela, sendu al ili la dek postulojn kaj inviton kontribui kandidaton – laŭeble naivan, ke li ne komprenu la riskojn.

Adela: Tuj mi faros tion.

Meri: Dume, ni pluiru al la tria punkto. Ni devas trovi okulfrapan nomon por nia nova tekniko. Mi jam petis vin pensi pri tio. Ĉu iu havas sugestojn?

Ken: ...Ĝekspiro... Bacon ... Lardo ...Bardo ... Kardo ... Ponardo ... Pom-ardo...

Derek: Silentu vi. Vi estas nur etmensa.

Mineke: Jen via akronimo! ETMENSA! Elektron-Transiga Mas-Energia Naiv-Samideana Alilokigo, mallonge ETMENSA.

Derek: Sed kial ni bezonas samideanon? Tiuj impresos stulte. Ni sendu respektindajn doktorojn! Kial ni bezonas samideanojn?

Mineke: Por ke la akronimo funkciiu!

Adela: Ĉu vi vere volus labori por projekto kiu nomiĝus ETMERDA?

Meri: Prefere estu NS.

Derek: Bone, do ni sendu naivajn soldatojn anstataŭ naivajn samideanojn. Almenaŭ ili obeos niajn ordonojn.

Kunio: Ĉu vi frenezas? Kaj transdoni regon por nia projekto al la militistaro?

Adela: Samideanoj estas, laŭ mia komputila raporto, almenaŭ pacaj batalantoj.

Meri: Nu, tio jam helpas. Bezonatas spacaj vagadantoj. La du jam proksimas.

Adela: Krome ni bezonas naivajn. Mia komputilo raportas ke soldatoj havas eksterordinare malaltan naivecan koeficienton dum samideanoj eksterordinare altan.

Meri: Bone, sendu la inviton, kaj ni atendu esperplene la respondon.

Sceno kvin:

Senesperplene la esperantistoj serĉas respondon, kiel atingeblas la verda venk'. Neniu havas freŝan ideon. Tago sekvas tagon, sen inspiro, ĝis iu tago kiam finfine Aldo vigle saltas en la kunven-ĉambron.

Aldo: Samideanoj, samideanoj! Aŭskultu! Aŭskultu! Venu!

Ĉiu: Kio? Kio? Novaĵo? Kio?

Aldo: Samideanoj... mi ankoraŭ ne havas freŝan ideon!

Ĉiu: Veee!

Miko: [kiel ĉiam ĉe la komputilo, subite elsaltas ekscite] Respondo! Respondo! Ni havas respondon el niaj dilemoj kaj problemoj! Legu ĉi tiun inviton! [ĉiu grupiĝas ĉirkaŭ la monitro kaj provas legi la tekston].

Mart: Invito kandidatigi samideanon por grava projekto ...ETMENSA, hmm, almenaŭ esperanta nomo. Sendi homon al Venuso. Esperantisto sur Venuso! La propaganda efiko estus enorma! Tere ni neniam verdigos eĉ 2% de la loĝantaro, sed Venuse povus esti 100%! Imagu! Sed kriteriojn mi vidas. Dek kriteriojn, [li rapid-legas ilin], jes, unuavice ili ŝajnas konvenaj. Eble ĉi tio estas la trarompo, kiun ni serĉis. Radikala ŝanĝo de direkto. Ne plu ni aspiras rekonon inter Nobeluloj, sed inter Etmensuloj.

Miko: Ne tiom ŝovu, vi rompos mian konekton. Mi elprintas la kriteriojn. [estu rapida eĉ tuja printilo!] Mart, laŭtleĝu la kriteriojn, kaj ni taksu ĉu ili konvenas.

Mart: Unu: Kapablo sidi senmove dum pluraj horoj.

Alano: Inaŭguroj de Universalaj Kongresoj.
Aldo: Partopreno en komitatkunsidoj. Tute konvenas.
Mart: Du: Kapablo resti optimisma spite kruelajn sortobatojn kaj neglekton.
Trev: Deĵorado en surstrata propaganda budo.
Klari: Aŭ eldonado de poemlibro en Esperanto.
Mart: Tri: Kapablo persisti kaj reprovadi kontraŭ sennombraj obstakloj.
Aldo: Akceptigi proponon dum komitat-kunsido.
Oskar: Aŭ ŝanĝi la Statuton.
Mart: Kvar: Kapablo je supernivela sintezo de ideoj unuavide nekombineblaj.
Bur: Verkado de kongresaj resolucioj... kaj la jar-raportoj.
Mart: Kvin: Kapablo komuniki kun renkontotaj estaĵoj sen komuna lingvo.
Klari: Esti diplomita Cseh-instruisto – geste, pupe, mime. Venuse, finfine miaj frazoj "Rozo estas floro" kaj "Table estas meblo" ekhavos sencon!
Mart: Ses: Kapablo elteni ekstremeojn de temperaturoj kaj malkomforton.
Oskar: Labortendaroj en Maroko kaj norda Finnlando.
Mart: Sep: Kapablo krei travivigajn solvojn el malkompletaj aŭ eksdatiĝintaj informoj.
Miko: Uzantoj de antaŭaj eldonoj de PV kaj PIV.
Mart: Ok: Kapablo elteni kruele ekscesajn kaj malhumanajn laborhorojn, sen la necesaj ripozaj kaj feriaj periodoj.
Alano kaj Bur ĥore: Deĵoranto en la Centra Oficejo de UEA.
Mart: Naŭ: Kapablo arigi, trakti kaj asimili amasojn da obskuraj datumoj.
Alano: Kompilantoj de membrostatistikoj de UEA
Mart: Dek: Kapablo el tiaj datumoj krei aŭdacajn kaj spirhaltigajn konkludojn
Oskar: Ĝuste tion ni faris por trovi 17...
Trev: ...18...
Oskar: ...milionojn da esperantistoj.
Mart: Bonege. Ŝajnas, ke ni povos proponi eminentan kandidaton. Kiu?
Klari: Mi ne povas forlasi miajn multnombrajn lernantojn. Ili ambaŭ malĝojus. Ni sendu varbulon. Se troveblas vivoformoj sur Vensuo, necesos unue varbi ilin al Esperanto. La instruado kaj aplikado estas postaj stadioj. Laŭ mi Trev ekiru.
Trev: Sed mia kampanjo disĵeti dudek mil varbilojn el helikoptero dum la jarfesto?
Mart: Mi prizorgos tion. Ankaŭ mi scias plenumi la desuprisman varbadon. Jes, vi iru!
Klari: Vi povos kunporti stokon da varbiloj por disdoni al la venusanoj.
Oskar: Kaj verdajn flagojn por proklami nian suverenecon sur la planedo.
Mart: Finfine vera Esperantujo!
Miko: Esperantio.
Trev: Konsentite! Mi estos la kandidato. Mi portos la venkon al Venuso!

Sceno ses:

Trev alvenas al la scienca laboratorio, kun dorsosako entenanta dentopaston, dentobrosan, tri naztukojn, du verdstelajn pinglojn, kvar esperantajn flagojn kaj 27,846 varbilojn. Li portas ankaŭ sekretan ŝu-telefonon per kiu komuniki kun la esperantistoj. Tie lin renkontas prof. Periment kaj la sekureca gardisto, serĝento Gorul.

Leks: S-ro Arbema. Ni kore bonvenigas vin al nia etmensa centro. Vi estas je la punkto helpi nin ŝanĝi la fluon de la historio.
Trev: Ĉu mi bone komprenis, ke vi vere sendos min al Venuso?
Leks: Tio estas ja nia intenco! Vi aŭdis pri NIFOj – flugantaj teleroj?
Trev: Jes.
Leks: Do, similos al tio. Nur ke la telero restos kaj vi flugos! Tuj! Sentempe! Pretertempe!

Trev: Kio? Neniu vespermanĝo kaj filmo?

Lari: Pro sekurecaj kialoj, vi ĉiam devas resti en akompano de stabano. Komprenite?

Trev: Fi! Err... Err... Mi... Mi komprenas.

Leks: Post momento, mi montros al vi nian laboratorion. Poste vi renkontos viajn kunvojaĝontojn, kaj posttagmeze ni sendos vin!

Voĉo: Doktoro Periment kaj Serĝento Gorul! Vokataj al la bufedo. Urĝe iru al la bufedo!

Leks kaj Lari: Restu ĉi tie. Ne foriru. Ni tuj revenos. *[ili ambaŭ eliras]*

Trev: *[per ŝu-telefono]* Saluton! Estrar-bazo! Mi konfirmas, oni sendos min al Venuso hodiaŭ posttagmeze! Sed muŝo en la medikamento! Mi havos kunvojaĝontojn! Kiuj? Ne, mi ne scias, sed mi renkontos lin post kelkaj minutoj. Mi provos ŝui denove, se eble.

Leks: *[revenas]* Falsa alarmo. Kelkaj piroj subite aperis sur telero en la bufedo. Nur kiel rezulto de fuŝita eksperimento.

Trev: Kio? Kiu eksperimento?

Leks: Ĉu mi diris tion? Ne ne, tion mi ne diris. Piroj aperis kiel rezulto de... de...

Lari: *[revenas]* ...ekstera mendo. Jes, tio. Sinjoro Arbema, kial vi tenas vian ŝuon en via mano?

Trev: Ho, mi uzas telefonon.

Lari: Kio? Uzas telefonon?

Trev: Ho, ĉu mi diris tion? Ne, ne, tion mi ne diris. Mi nur... nur... eligas ŝtonon.

Lari: Bone. Mi pluiras nombri la pomojn en la bufedo. Leks, gvidu nian gaston plue. Ĝis revido! *(Li eliras)*.

Leks: Sekvu min. Jen la laboratorio, envenu. Bonvolu ne tuŝi la teknikaĵojn.

Trev: Kiuj estas tiuj du teleroj?

Leks: Ili estis uzitaj en niaj fruaj eksperimentoj, kiam ni transportis pirojn.

Trev: Ĉu mi rajtas tuŝi ilin?

Leks: Tute ne! Ili povus eksplodi.

Trev: Kial?

Leks: Ili estas piro-teknikaĵoj!

Adela: *[envenas kun la du ceteraj vojaĝontoj, f-ino Elfrunt kaj s-ro Ernep.]* Jen niaj aliaj vojaĝontoj, mi montris al ili la transsendejon kaj la telerojn.

Leks: Jen nia tria vojaĝonto, s-ro Arbema.

Adela: Mi prezentas f-inon Elfrunt...

Deb: Nomu mi Deb.

Adela: ...kaj s-ron Ernep.

Ŝlej: Nomu mej Ŝlej.

Trev: Kaj mi estas Trev. *[ili manpremas kaj salutas]*.

Ŝlej: Non puki Esperanto. Puki Volapuk. Bruk "traduk-maŝino" *[tion li havas, montras]*

Deb: Mi parolas iomete Esperanto, ĝi estas mia dua internacia lingvo. Mia praaavo estis Esperantisto ... dum certa tempo.

Adela: Jen la ĉefo de nia laboratorio kaj projekto, doktorino Toplen.

Meri: Nomu min Meri, bonvenon kaj gratulon al vi ĉiuj. Nur por esti tute certa. Ĉu vi trimbaŭ estas aŭtentikaj samideanoj?

Trev: Certe. Mi estas ĝisosta esperantisto, kaj mi havas la saman ideon kun la ceteraj esperantistoj.

Deb: Kaj mi estas ĝisbrusta idisto. Mi havas la saman ideon kun la ceteraj idistoj.

Ŝlej: Volapuk under meinem knie. Ganz ideal mit zweite Pukist. *[parolas tra la aŭtomata traduk-maŝino]* Kaj mi estas ĝisgenua Volapukisto. Mi havas la saman ideon kun la alia Volapukisto.

Meri: Bonege! Estas klare, ke vi trimbaŭ estas modelaj samideanoj.

Leks: Antaŭen al ETMENSA aventuro!

Meri: Jen tri teleroj. Bonvolu, ĉiu staru sur unu telero. La analogaj teleroj estas virtualaj, kaj estas lokitaj sur Venuso. Ha, sinjoro Arbema. Vi havas dorsosakon. Bonvolu kontroli ĝiajn dimensiojn tie. *[staras angule mezurilo kiel nuntempe uzata en flughavenoj por la kunportotaj]*

valizoj; Trev enmentas la sakon, ĝi taŭgas. Dume li kaptas la okazon nerimarkite forpreni sian ŝuon kaj sekrete voki al la esperantistoj].

Trev: Problemo! Estos du aliaj vojaĝantoj. Unu Idisto, unu Volapukisto. Kion mi faru?

Mart: Konvertu ilin al Esperanto!

Trev: Sed kiel... *[Meri proksimiĝas]*. Mi devas finŝui. Ĝis!

Mart: Bonan vojaĝon kaj sukceson!

Meri: *[rigardas la sakon]* Bone, via dorsosako konformas. Ne necesas demeti viajn ŝuojn. Ili transportiĝos kun vi. Ĉiu sur la loko! *[Trev remetas sian ŝuon. Ili ekstaras sur la teleroj]*

Kunio: Nun mi fermu la kurtenojn.

Adela: Kaj mi komencas la transigan algoritmon. *[pulsas, ritma sono audeblas]*

Kunio: Ni havas ritmon.

Trev: *[de malantaŭ la kurteno]* Jes, mi havas r... r... rit... rit... mon!

Deb: *[de malantaŭ la kurteno]* Ankaŭ mi havas ritmo. Kio mi ne havas 'stas akuzativo.

Ŝlej: *[de malantaŭ la kurteno]* RI... RI... RI.... TMO... TMO... TMO.... TIMO... TIMO!

Bart: Ni atingis la kritikan koncentriĝon.

Leks: La elektronoj ekscitiĝis.

Meri: Funkciigu la mas-transigon! *[lumoj, fumo]*

Adela: Ĉu sukcesos? Ĉu niaj jaroj da laboro portos fruktojn?

Kunio: ... portos homojn...

Adela: Fortiru la kurtenojn!

Kunio: Mi fortiras la kurtenon! Mi malkovras la telerojn... *[ĉiuj homoj malaperis]* ...sen pomo, sen piro, sen surprizo. Miraklo!

Meri: Ni ŝanĝis la vizaĝon de l'scienco!

Sceno sep:

La esperantistoj scias nur ke la trio malaperis, sed ili jam sopiras anonci al la mondo pri esperantistoj kaj Esperantujo (aŭ Esperantio) sur Venuso. Aperas la samaj roluloj, krom ke Trev estas anstataŭata de nova estrarano pri varbado, Linda Konvink.

Mart: Kaj la venonta tagorda punkto: tri komo kvar komo du oblikva retro-streko ok dupunkto sep nulo asterisko kvar: taksado de la nombro de esperantistoj sur Venuso.

Bur: Facila afero! Unu! Kaj baldaŭ du aŭ tri. 33%, 50% aŭ... ni fidu... 100%!

Mart: Do, la venonta tagorda punkto: tri komo kvar komo du oblikva retro-streko ok dupunkto sep nulo asterisko kvin: taksado de la nombro de esperantistoj en la mondo. Nia celo kompreneble estas la Venus-Tera komparo. La proporcio de esperantistoj sur Venuso superu la proporcion sur la tero kiel eble plej multe. Sekve, ni bezonas novan elirpunkton por ĝin elkalkuli. Do, mi transdonas la parolon al nia estrarano pri elirpunktoj...

Aldo: *[alvenas haste, malfrue, manĝante sandviĉon]* Pardonu mian malfruon, sed de la sepa ĝis la naŭa mi estis en seminario de la CE de IAdEM, de naŭa ĝis deka en kunsido pri KSM de UEA, poste en fakkunsido de BEMI kaj fine kunordiga forumo kun la GK de ILEI, mi tute ne havis tempon manĝi...

Mart: Nu, trovu lokon, atentu pri via sandviĉo. Denove, la parolo al S-ro Aktera. Oskar!

Oskar: Kiom da landoj estas en la mondo?

Krista: Preskaŭ ducent.

Bur: Do, ni diru cent naŭdek. Tio estas malpli ol ducent.

Alano: Kial ne diri cent dek? Ankaŭ tio estas malpli ol ducent.

Krista: Cent dek estas pli certe malpli ol ducent ol cent naŭdek estas malpli ol ducent.

Oskar: Certe.

Krista: Multe pli ĝi estas malpli.

Mart: Do, cent dek landoj.

Oskar: Mi prognozas, ke la nombro da landoj malkreskos je 6% tra la venontaj dek jaroj.

Alano: Do, cent unu.

Mart: Kaj plu...

Alano: Niaj Landaj Asocioj havas, laŭ pli freŝa statistika esploro, averaĝe ducent kvardek sep membrojn...

Linda: Se oni elkalkulas tiujn, kiuj nur kotizis...

Bur: ...aŭ donacis...

Oskar: ...aŭ intencis kotizi...

Alano: ...aŭ intencis donaci...

Mart: ...antaŭ pli ol du jaroj.

Klari: Kaj se ni elkalkulas tiujn, kiuj nur ŝovis nazon tra kursejan pordon...

Linda: ...aŭ rifuzis varbfolion dum niaj stratfestaj manifestacioj...

Krista: Jes, jes, tiujn ni devas aldone elkalkuli! Certe, do... kie mia kalkulilo?...

Bur: Momenton, ne! Tiuj estas jam elkalkulitaj en la supra averaĝo...

Alano: ...mi ne kredas...

Oskar: Ilin ni prefere elkalkulu aparte. Alie, mi prognozas, ke ni bedaŭros. Ni ne risku malneglekti ilin.

Linda: Kaj ili estas malmultaj, rigardu ĉi tiun raporton, ĵus alveninta el Skotlando... mi legas ĉirkaŭ la neĝo-makuloj... "Ni disdonis dudek tri informilojn surstrate en 25 horoj kaj devis stoki la restantajn kvarmil naŭcent sepdek sep.

Alano: Do, jen dudek tri, kaj jam en unu lando!"

Krista: Ho jes, dudek tri oble 101 estas... estas... kiu forprenis mian damnindan kalkulilon?

Mart: Kial tiu manko de interesiĝo en Skotlando?

Linda: Nu, mi legas plue: "Nia oferto pri gajneblaj senpagaj vojaĝoj al venonta UK en Detroit kreis malmultan intereson..."

Alano: Krome, ni ne planas Universalan Kongreson en Detroit.

Krista: Ha, jen mia kalkulilo inter du panoj de via sandviĉo, Aldo.

Bur: Sed necesas unue fari la bazan kalkulon. 247 x 101 kaj poste adicii la 23 x 101...

Alano: ...aŭ subtrahi...

Krista: Jes, jes, mi faras ĉion ĉi... la rezulto estas...

Linda: Jes, jes, diru! Kio estas la rezulto?

Krista: Momenton, momenton... 279 milionoj, 472 mil 356.

Mart: Tio ŝajnas iom nekredinda.

Krista: Efektive. La klavoj gluiĝis. Aldo, kial vi nepre devas manĝi konfitaĵajn sandviĉojn?

Mart: Prave. Tio montras malrespekton por la seriozeco de nia laboro.

Krista: Mi iros purigi mian kalkulilon.

Alano: Dume, ni pensu pri pli da faktoroj.

Linda: Nu, radio stacioj, dudek tri konataj, sed nur dek kvin fakte nun elsendas, kun averaĝe po dek kvar aŭskultantoj...

Bur: Televidaj stacioj elsendintaj intervjuojn aŭ raportojn pri ni, dek du, kun averaĝe po naŭdek sep mil spektantoj, el kiuj naŭdek du mil foriris pisi aŭ pretigi kafon dum nia programero...

Aldo: Kaj la pasivaj esperantistoj, kiuj malkiel mi, ne aliĝas al asocioj: se pasivaj, ne rajtas enkalkuliĝi.

Klari: Ni ekskludu ankaŭ la etan armeon da eternaj komencantoj...

Linda: Kaj la konvertitaj volapukistoj kaj idistoj kaj interlingvistoj sumas je nur dek unu.

Alano: Kaj la aĉetantoj de libroj, kompakt-diskoj, vidbendoj kaj verdstelaj pingloj estas certe jam kalkulitaj sub aliaj kategorioj, do ni subtrahu ilin.

Krista: ...jes, jes, mi subtrahis la ciferojn por ĉiuj tiuj grupoj.

Miko: Ni reviziu la nombron da hejmpaĝoj. Ni uzu la konatan nombron; ial mia fuŝa serĉilo enkalkulis paĝojn sen rilato al nia kara lingvo.

Krista: ... Bone, bone, nun mi preparas la finan sumon!

Mart: Mi sentas ke ĉi-foje ni vere progresas en nia strebo. Vi ĉiuj bonege kontribuis hodiaŭ! Vere kreiva pensado. Per tio la movado progresas!

Krista: ...kaj la grandioza sumo, la nombro de esperantistoj en la mondo estas... estas ... dek sep! *[Longdaŭra kaj intensa aplaŭdado, suplementita per trimufaj hupoj kaj krioj]*

Mart: Bonege! Tiel la Venusa-Tera proporcio estos vere impona.

Linda: Tiun novan statistikon ni povos uzi por lanĉi tutan faskon de novaj varbfolioj.

Oskar: Ni prezentu ĝin kiel prognozon, ĝis konfirmiĝas ke Trev alvenis kaj bone fartas.

Mart: Bone, ni nomu ĝin la Venus-Tera prognozo!

Oskar: Mallonge, la Ve-Ter-prognozo!

Bur: Momenton. Se estas nur dek sep esperantistoj en la mondo...

Alano: Kaj jam estas naŭ el ni en ĉi tiu kunsido...

Bur: Kaj ni ne povas dubi pri la fidela kaj lojala esperantisteco de almenaŭ ...kiom ... dek unu?

Alano: ...eble dek...

Bur: ...dek esperantistoj ekster ĉi tiu ĉambro...

Alano: Ni devas konkludi, ke el inter ni estas almenaŭ du aŭ tri malsinceraj, nelojalaj malsamideanoj...

Bur: Enŝrankaj idistoj... kaŝaj apogantoj de la angla... sekretaj raŭmistoj... nekredantoj je la fina venk'...

Alano: Mi proponas, ke ni tuj saltu al tagorda punkto sep komo du komo kvar oblikva retro-streko sep dupunkto kvar asterisko tri: Esploro de la fidindeco de niaj ŝlosilaj agantoj.

Mart: Kial ne? Ankoraŭ ne venas novaĵoj el Venuso. *[surmetas nigran mortpundiran juĝistan ĉapon]* Mi estas preta aŭdi la unuajn denuncojn aŭ konfesojn...

[Ĉiu timas kaj tremas en la anguloj, mallumiĝas la scenejo]

Sceno ok:

La surfaco de Venuso. Iom lumiĝas kaj videblas afiŝo "Tero: 46,576,943 km." kaj tri virtualaj teleroj. Mallumiĝas denove. Kiam lumiĝas, sur du teleroj videblas Trev kaj Deb. Sur la tria telero staras pomo.

Trev: Ni alvenis. Ni travivis. Ĉu vi bone fartas?

Deb: Jes, mi kredas. *[kalkulas korpo-partojn]*. Mi havas ĉiuj korpo-partoj.

Trev: Ha, vidu sur la tria telero... pomo!

Deb: Hmmm! Interese. Certe bongusta.

Virtuala serpento: *[englitas]* Certe! Malpermesita frukto! Sed bongusta. Eta mordo – kaj plu al la dolĉaj pekoj!

Trev: Ne, ne! La pomo aperas kie devus esti Ŝlej. Ignoru tiun serpenton. Ĝi estas nur virtuala. Ĝi estas tento-serpento. Virtuala vipuro.

Deb: Mi manĝas! *[ŝi manĝas]* Kaj nun ni peku! *[ŝi forkondukas lin]*.

Sceno naŭ:

La paro bonfartis sur Venuso. Dum la unuaj du monatoj la sciencistoj tenis kurtenon da kompleta silento super la eksperimento. Nur en la tria monato la esperantistoj rajtis paroli la unuan fojon per la ŝutelefono kun la Venusanoj.

Mart: Ha, finfine, la ŝutelefono sonas. Laŭplane.

Miko: Laŭplande.

Mart: *[li deprenas sian ŝuon kaj metas al la orelo]* Saluton, Trev, ĉu vi aŭdas min? Kiel vi fartas? Kion vi faris post via alveno? Kiel Deb fartas? Kion ŝi faris?

Deb: Pom' nondertera manĝyatis far' nu.

Trev: Deliciozisimo!

Mart: Kio!??

Trev: Novela langwo kreitos far' nu.

Deb: Venuspuk se nomato.

Trev: Plumyeu! Plumyeu! Facilamente parlatu!

Deb: Tray facilamente parlatu.

Mart: Kion ili diraĉas?

Klari: Ili kreis novan lingvon. Mi iom komprenas. Tiel parolas miaj eternaj komencantoj.

Mart: Ve! *[al Trev]* Rakontu pri via lingvo.

Trev: Awkyun signales de l'super.

Deb: Abas aw literes tschapelitos!

Trev: Adyeu aw problemas akuzatifos!

Mart: Ve! La idistino konvertis Trevon.

Oskar: Pli ol konvertis. Tio ne estas ldo, sed iu nova Venuspuk. Ili donu pli da klarigoj.

Deb: Nostros novela langwo kontenas multos noveles literes excitamentales, uniuos, impawtantes y simpawteticos.

Trev: Onŝwit, ilya, from naŭ on, awkyun peski signales de l'interpunktuatsiyon

Deb: Hura! Y anke, from naŭ on, awkyun literes mayusklos

trev: y anke sur 0e venuso awkyun akademio awkyun lingva komitato awkyun peski redaktoro avek 0e krayonj reuzhj

deb: nu fayzonjz nostos propras regulaciones ewwigaualonj

trev: avek beuku d'excepciones...

deb: ...per 0'intelektual stimula0yonj

trev: en somario multos pluŝ facilamente ekriwato y parlatu komo 0'antikwa ewperanto

deb: trev tu ditiŝ 'komo'

trev: si

deb: mey 'komo' ista uno peski signales de 0'interpunktuatsiyon

trev: nono solamente en 0'antikwa ewperanto en 0a novela venuspuk 'komo' ista ewwivalentos de fronsay 'comme', saytadir, 'kiel' en 0'antikuos ewperanto

deb: trev tu uzitiŝ citilo tu ista non purisma venuspukisto...

trev: kio mi nepurisma mi 0a unua 0a primera 0a plumyeu... *[degeneras en kwereladon]*

Mart: Ve! Plena fiasko! Neniu vorto de Esperanto sur Venuso. Neniu favora statistikio. Neniu novaj faldfolioj. Neniu venusa venk'.

Oskar: Kaj nun ili nur kwerelas. Mi prognozas, ke nenio bona venos el ĉi tiu venusa aventuro.

Mart: Trev, Trev. Ĉu vi aŭdas min? Parolu al ni Esperante. Kio okazis?

Trev: Ni kwerelis akre. Granda lingva skismo. Mi daŭre fosos mian sulkon kaj uzos Venuspukon, sed Deb parolas nun VenuspuklLon, kiun ŝi nun eknomas DebuspuklLo. Tion mi mallongigos simple al DebLLo.

Deb: Debila vi! Fuŝa lingva perfidulo!

Trev: Ha, mi sukcesis igi ŝin diri du frazojn en la antikva Esperanto! Sed nun mi lacas paroli tiun komplikan lingvon, mi reiros al la vera, tradicia Venuspuko ... aŭ ... kial ne... havas agrablan sonon... TrevLLo. Ha, ha, Mi trevilas! Mi trevilas! Fakte, mi ege vilas! Harara! Horora! Hura-ra! Hura! *[malaperas en distancon]*

Mart: Jen la lasta sencohavaĵo, kiun ni aŭdos de li.

Alano: Nia tuta strategio en ruinoj! Forgesu la venusian venkon.

Sceno dek:

Tri monatojn poste, la novaĵoj el Venuso bonegas por la sciencistoj, sed neniel boniĝas por la esperantistoj.

Mart: Kio nova el Venuso?

Alano: Post kiam ili manĝyatis ... pardonu... manĝis... s-ron Ernep, ili evidente pekis produktive. Survojas ĝemeloj, do estos jam baldaŭ kvar Venusanoj.

Mart: Kaj neniuj parolos Esperanton?

Bur: Neniu. Trev kaj Deb ambaŭ parolas siajn proprajn lingvojn kiam ili estas apartaj, kaj ili konstruis plian interlingvon por uzo kiam ili kunos. Ili planas instrui al la infanoj ĉiujn tri lingvojn.

Mart: Kaj neniuj el ili similas al Esperanto, eĉ iomete?

Alano: La malsameco kreskas de tago al tago.

Bur: Estas granda lukto eĉ kompreni ilin. Ni devas ĝisdatigi PVV kaj PVIV en la komputilo ĉiutage.

Mart: PVV kaj PVIV?

Bur: Purisma Venuspuka Vortaro kaj Progresiga VenuspukLa Vortaro.

Mart: Kion vi aliaj opinias?

krista: katastrofiquales

klari: koschmarischiqualles

miko: koojanasquaatsi

Oskar: Mi prognozis, ke sakstrata estos la Venusa aventuro. Mi diris ke venusa venk' ne venus.

Mart: Nu, ni ne riproĉu nin. Ni fosu nian sulkon. Ni reiru al nia tagordo. Al la punkto tri komo kvar komo du oblikva retro-streko ok dupunkto sep nulo asterisko kvin: taksado de la nombro de esperantistoj en la mondo. Se Aldo jam sidas kaj ne manĝas sandviĉon, mi transdonas la parolon al nia estrarano pri elirpunktoj...

Oskar: Ni prognozu, kiom da landoj estas en la mondo.

Krista: Pli ol ducent.


Bur: Do, ni diru ducent dudek. Tio estas pli ol ducent.

Alano: Kial ne diri tricent dudek? Ankaŭ tio estas pli ol ducent.

Krista: Tricent dudek estas pli certe pli ol ducent ol ducent dudek estas pli ol ducent...

Oskar: Certe.

Krista: Multe pli ĝi estas pli....



FINO